



# NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO  
DE LA  
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Redaktoro kaj responde eldonanto :

Lucien BOURGOIS,  
21, Rue Gambetta,  
NOYELLES=GODAULT (P.-de-C.).  
Ĉiun presigotan materialon  
oni sendu al la ĉisupra adreso.

Kotizoj (kun bulteno)

- a) Junuloj : 2 Fr.  
b) Aktiva membreco : 3 Fr.  
c) Subtenanto : 5 Fr.  
pagendaj al C.C.P. LILLE 517-15  
Fédération Espérantiste du Nord,  
17, Rue de Bouvreuil, ARRAS (P.-de-C.).

Informilo n° 5

Septembro-Oktobro 1963

Estimataj Gesamideanoj,

La Nordfranca Esperanto-Federacio elkore invitas vin honori per ĉeesto ĝian aŭtunan renkontiĝon, kiu okazos en Tourcoing (Nord), la 13-an de oktobro 1963, laŭ jena programo :

- 10-a h. : Laborkunsido en "CENTRE CULTUREL",  
100, Rue de Lille, TOURCOING.
- 11-a h. : Distra programero (skeĉo).
- 11-a h. k. duono : Akceptado de la kongresanoj en la urbdomo kaj vizito de la ekspozicio.
- 13-a h. : Komuna tagmanĝo en la Stacidoma Bufedo - Loterio.
- 15-a h. k. duono : Opa vizito de la sonorilturo kaj ties folkloro muzeo (prezo : 0,50 Fr.).
- Komuna tagmanĝo : Kosto po aliĝanto : 15 Francaj Frankoj (inkluzive trinkmonon). Se dezirate, oni povas antaŭpagi, ĝiante la monon al la federacia ĉefsekretario C.C.P. LILLE 2303-96, S-ro Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, CALAIS (P.-de-C.).
- GRAVA : Ĉu vi antaŭpagos aŭ ne, nepre avertu S-ron DITACROUTE pri via partopreno, precizigante la nombron de la personoj, kiuj manĝos - Limdato : 5-an de oktobro.
- MENUO : Diverspecaj antaŭmanĝoj - "Filets de Saint-Pierre à la Ducléré" - "Chicken-Pie" (Kokidaĵo, specialaĵo de la estro) - Fromaĝoj - Fruktoj - Akra blanka vino (po unu botelo por 6) - Ruĝa vino (po unu litro por 4) - Biero - Kafo - Fajna Brando.

Ĉeestu multnombre por favore impresi la oficialajn instancojn!

De via apogo dependas la revigliĝo de nia movado en tiu grava nordfranca urbo. Antaŭdankon!

LA FEDERACIA ESTRARO.

BELA FRANCLINGVA TURISMA PROSPEKTO PRI TOURCOING estas havebla de : Centre d'Accueil des Amis de Tourcoing, Contour St-Christophe, TOURCOING (Nord).

NIA VIVO

Universala Kongreso de U.E.A. - 30 membroj de la Nordfranca Esperanto-Federacio ĉeestis la 48-an U.K. en Sofio, kiu arigis 4.000 partoprenantojn el 40 landoj.

U.F.E. - Ni tutplezure eksciis, ke du federacianoj, S-roj Georges ODENT k Lucien GILOTEAUX, fariĝis komitatanoj de la nacia E-asocio.

Berck-Plage (P.-de-C.) - Dum la somerferioj, S-roj BORDESSOULLE Maurice k BOURGOIS Lucien vizitis esperantiston el la pariza regiono, nun hospitaligita en malsanulejo de Berck.

Sendu salutkarton al : S-ro R. ETIENNE,  
S-ce Kirmisson, Hôpital Maritime, BERCK-PLAGE (P.-de-C.).

Bourbourg (Nord) - Membrino de la loka grupo, F-ino Claude VASSEUR, ricevis la 2-an premion en supera piano-ekzameno de la Lille-Konservatorio.  
Notinde, ke la ekzamenantaro unuanime aljuĝis al ŝi tiun distingafon.  
Ni elkore gratulas.

Calais (P.-de-C.) - S-ro DITACROUTE akceptis ĉe la Mara Stacidomo 4 lernantojn de la Londona E-klubo.

Hénin-Liétard (P.-de-C.) - Nia federaciano BOURGOIS Alain, nevo de la redaktoro de "Norda Gazeto", ricevis la inĝenieran diplomon komence de Julio. Ni varme gratulas.

Menciinde, ke li poste entreprenis kun du samlernejanoj vojaĝon per kvarĉevalo ĝis Egiptujo. Por tio, li kompreneble kunportis la UEA-jarlibron kun adresoj de delegitoj de la Universala Esperanto-Asocio. Detaloj sekvos.

Méricourt (P.-de-C.) - Iniciate de Ges-roj VAN PARYS, bela ĉaro "Esperanto" kun granda afero reprezentanta la terglobon k banderolo "Se la tutmondaj homoj..." partoprenis la "Revenfeston", kermeson aranĝitan de la loka rondo de militintoj k militkaptitoj. Ĝi rikoltis multajn aplaŭdojn.

Roubaix (Nord) - Dum unumonata restado en BERLINO, federacianoj enketis pri la nuna strato de Esperanto ambaŭflanke de la "Muro".

Tourcoing (Nord) - Kun afabla kunlaboro de S-ro Otto Böhm, UEA-delegito en Karlsruhe (Germanio), la loka rondo partoprenis filatelan ekspozicion, la 15-an de septembro, per elmontrado de korespondaĵoj el okdek-kvin landoj.

La urba biblioteko, - place A. Roussel - , jam akiris jenajn verkojn :  
- D-ro Esperanto - Nepalo malfermas la pordon - Kanako el Kanakam - Dana antropologio - La verda raketo - L'Espéranto, fil d'Ariane du coeur et de l'esprit.

La gazetaro amplekse raportis k laŭdis ĉi tiun iniciaton.

Lastatempe vizitis la rondon Ges-roj STOBBAERTS (Belgio) - I. CALABRESI k R. LISI (Italio).

Debato pri Esperanto okazos ĉe la Unesko-klubo.

Wattrelos (Nord) - Novzelandanoj vizitos la lokan delegiton, S-ro Giloteaux, fine de septembro, - Federacianoj partoprenos la aktivaĵojn de la loka sekcio pri Internaciaj Interŝanĝoj.

Raporto pri kunveno de "Verda Stelo"  
Kaleza kultura sekcio de Nordfranca Esperanto-Federacio  
la 7-an de Julio 1963  
178, Chemin Castre.

---

Sub la aŭspicio de Nordfranca Esperanto-Federacio

Ĉeestis la kunvenon :

Samideanoj Robert BUERICK, Prezidanto de "Verda Stelo", Delegito de U.E.A.

Fernand DITACROUTE, Sekretario de Nordfranca Esperanto-Federacio.

Edouard BONVOISIN, Departementa Sekretario de Nordfranca Esperanto-Federacio.

Tagordo : Organizado de la Markola Kongreso de 1964.

Diversaj demandoj.

La malgranda komitato decidis :

- Organizi la Markolan Kongreson (franclingve : Congrès du Détroit) en Kalezo, kun helpo de Norda Federacio.

- Kunvenigi en Kalezon, dum proksima septembro, pli vastan komitaton konsistantan el partoprenantoj de Norda Federacio kaj "laŭeble" Belgaj kaj Anglaj Samideanoj. Okaze de la kongreso eble fariĝus ebla la ĝemeligo de la grupoj de Kalezo kaj de Southend-on-Sea. La urboj Kalezo kaj Southend-on-Sea estas jam ĝemeligitaj. Ni plue pripensos la aferon.

- Reorganizi la Kalezan grupon "Verda Stelo" sub nova nomo, kaj sub la aŭspicio de Norda Federacio. La nove reorganizita grupo povus esti nomata "Kaleza Kultura Centro por Esperanto" (kiel ekzemplo); franclingve : "Centre Culturel Calaisien pour l'Espéranto".

- Skribi al ĉiuj ankoraŭ konataj membroj de "Verda Stelo", petante de ili decidon por aliĝo al la nova grupo, kaj en kazo de jesa respondo, kotizojn de 1963 por Nordfranca Federacio kaj reorganizita grupo.

- Kunvoki la membrojn de la nova grupo por farotaj decidoj pri la vivo de la grupo.

- Starigi Esperantistan Bibliotekon en la sino de la urba biblioteko. Tio havigus al ni la jenajn avantaĝojn :

1°/ La libroj estus bone konservataj kaj protektataj, ĉar urba oficiala bibliotekisto prizorgus ilin.

2°/ Ĉiuj esperantistoj povus ilin pruntepreni tiel facile de la urba biblioteko, kiel de kluba biblioteko.

3°/ Tio eble altirus al ni la simpation de la urbestro.

4°/ Tiamaniere neesperantistoj havus sciigojn pri gravaj internaciaj verkoj tradukitaj en Esperanton; kaj tio eble instigus ilin lerni nian lingvon.

5°/ La gazetaro, post nia akordiĝo kun la urba bibliotekestro, menciis ĉiun donacon; do oni parolus pri Esperanto.

Sekve, la libroj, kvankam perditaj kiel propraĵo de la grupo, plenumus sian mision : disvastigi nian lingvon, kaj samtempe diskonigi la tutmondan kulturon.

Redaktita de S-ro BONVOISIN.

Novajoj el niaj amikoj : Nia fora membro, S-ro Jean HENIN, skribas : Pointe-Noire (Kongolando) - ... Mi provis eduki belkajn esperantistojn en Kongolando, kiel kelkaj kolegiroj komencis la perkorespondajn kursojn, kiujn mi aranĝis. Bedaŭrinde, la somerferioj revenigis tiujn junulojn al siaj resp. vilaĝoj; k mi timas, ke ĉio estos rekomencenda, se ili decidiĝos daŭrigi ĉe la nova studjaro. Ĉiaokaze, mi esperas plue okupiĝi pri ili; k mi certe revenos Afrikon.

S-ro Jean HENIN ĵus finis la soldatservon k loĝas nun en GLASGOW. Adreso : S-ro Jean HENIN, Assistant Teacher of French Govan High School, 425 Paisley Rd West, GLASGOW - SWI - SKOTLANDO (Britujo).

Tokio (Japanujo) - Depost sia reveno el Eŭropo, S-ro Taro NIŝIUMI fervore laboras por la movado. Lastatempe, li verkis plurajn artikolojn k aktivis en la Japana Esperantista Montamantaro. Kun 21 geesperantistoj, li ekskursis en la Japanaj Alpoj k surgrimpis la montojn KAI-KOMA (2965 m.).

---

### ESPERANTAJ MANIFESTACIOJ :

12-an de oktobro 1963 : en la ĉefaŭlo de la urbdomo de Tourcoing (18-a h.).

Inaŭguro de la ekspozicio : "ESPERANTO, "Telstar" de la internaciaj rilatoj" (daŭro : 12-a ĝis 20-a oktobro).

La federacio varme rekomendas al siaj membroj el Lille-distrikto ĉeesti la oficialan inaŭguron.

13-an de oktobro 1963 : aŭtuna federacia renkontiĝo en Tourcoing.

En preparo (Jaro 1964) : Trilanda Konfederacia Kongreso en Kalezo.

Respondeculo : S-ro Fernand DITACROUTE, Ĝenerala Sekretario de la Nordfranca E-Federacio, 178, Chemin Castre, CALAIS.

- Beneluxa Kongreso en Liège (Esperanto, 20, Rue V. Raskin, LIEGE).
- Tago de Esperantistaj Fervojistoj en Bruselo.
- Nacia UFE-Kongreso en Pariza Foiro (Pentekoste).
- Universala Kongreso de UEA en Hago - Nederlando (aŭguste), sub alta protekto de Ŝia Reĝina Moŝto Juliana.

Ekde la 9-a de septembro, ricevas aliĝojn por la du ĉi supraj kongresoj :

- Union Française pour l'Espéranto, 34, Rue de Chabrol, PARIS (10°).

---

PERKORESPONDA KURSO : Ĉiuj federacianoj S E N E S C E P T E bonvolu reklami pri ĝi al siaj konatuloj, en la lokoj, kie ne funkcias kurso. Interesatoj sin turnu al : S-ro Jean LENEL, 26, Rue Donckèle, HAZEBROUCK (Nd). VARBU NOVAJN MEMBROJN! Ni devas fieri esti esperantistoj!

Krom la netakseblaj praktikaj servoj, kiujn povas havigi al la hodiaŭa mondo la internacia lingvo, Esperanto estas la plej taŭga rimedo por interkompreniĝo de la homoj k ties reciproka interamikiĝo. Ĝi venkos ĉiujn barojn dank' al la neŝanceliĝanta obstino de ties uzantoj.

La interna ideo de nia movado indas, ke oni batalu por ĝi. Ek al la venko!

El la gazetaro : "France-Soir", sabate 17/8. "Mi parolas 15 lingvojn asertas ĉi tiu korbisto". Sur la ĉefvojo 7-a, ĉe la tuja proksimeco de Orange, Guy BES, korbisto k estonta diplomato, sciigas per aviztabulo, ke li povas vendi siajn verkojn, uzante por tio 15 naciajn lingvojn. Li certigas, ke li krome regas Esperanton. Tiu ĉi 21-jara poligloto estas la filo de emerita aviadmajoro.

POLIO-REVUE (julio-aŭgusto 1963) "La victoire de l'Espéranto", traduko de Advokata Moŝto Jean Dutilleul, el artikolo de F. Charley aperinta en "Revue Française d'Espéranto".

Tra la gazetaro

En la numero de marto-aprilo 1963 de "La Revue des Postes et Télécommunications de France", Jean COLLOMB, Prezidanto de "PTT Esperantista Asocio", detale raportas, paĝo 43, pri la unua kultura vesperkunveno de tiu asocio, la 17-an de novembro 1962. Ĝi okazis en la kongres-salono de la Ministrejo pri Poŝtoj kaj Telekomunikoj.

La filmo "PTT-Magazino n° 17", postsinkronigita en Esperanto, estis projekciita. Oni aŭdis gajigajn rakontetojn, monologon, kantojn, franclingve kaj Esperantlingve. Estis ankaŭ prezentita sona muntaĵo, farita sur sonbendon el radiodisaŭdigoj en Esperanto. La teatra trupo de la Esperantista Fervoĵista Asocio ludis en Esperanto la unuaktan teatraĵon "Tikla dosiero" de Jean Thierry.

Konklude, la aŭtoro de la artikolo deziresprimas, ke tiu sukcesa vesperkunveno montris, ke la lingvo Esperanto, adaptita al ĉiuj modernaj esprimrimedoj : teatro, kino, radiodissendo, estas preta ludi sian rolon, kiel internacia vehikla lingvo.

(Komunikaĵo de S-ano BONVOISIN).

NI LEGIS POR VI.

"Les Cahiers rationalistes" : LA RAISON CONTRE BABEL  
(juillet-août 1961) - N° 197. (40-paĝa).

Verkis André CAUBEL, Sekretario de Orleana Sekcio de Racionalista Unio. Prezo : 1 Fr. + sendkosto : 0,05 (tarifo gazetoj).

Mendebila ĉe Union Rationaliste, CCP PARIS 1471-64.

24, rue des Grands-Augustins, Paris-6°.

Elstara franclingva traktaĵo, per kiu la aŭtoro objektive konsideras ĉiujn aspektojn de la lingva problemo. Li prezentas la diversajn interkomprenilojn uzatajn de la homoj de la praaj tempoj ĝis la nuntempo (tradukado, signoj, pazigrafioj, tradukmaŝinoj) kaj venas al la konkludo, ke nenio povas taŭge anstataŭi la rektan komunikadon, la homan interrilaton.

Post analizo de diversaj proponoj pri uzado de naciaj lingvoj (dulingvismo, trilingvismo, eĉ multlingvismo! ; aŭ elekto de unu sola superreganta lingvo, li deduktas, ke la sola racia solvo kuŝas en uzado de konstruita lingvo.

S-ro CAUBEL rakontas la historion de la diversaj projektoj... la unua konstruita lingvo, kiu iam funkciis, estis Volapük (1879). Tamen, apero de Esperanto (1887) signis ties disfalon. Esperanto vastskale disvolviĝis antaŭ 1914, postvivis du mondmilitojn kaj ĝi ankoraŭ arigas nuntempe la gravan plimulton el la praktikantoj de internacia lingvo. Postvivis kvar fakte uzataj interkompreniloj : el 100 uzantoj, oni nombras 90 por Esperanto, 2 ĝis 3 por Ido, 4 ĝis 5 por "Occidental" kaj 3 ĝis 4 por "Interlingua".

Sume : Tre interesa kajero, kiun ĉiu defendanto de nia lingvo devas havigi al si.

Recenzis : Lucien BOURGOIS.

ETRE ESPERANTISTE

Etre espérantiste...

Ce n'est pas seulement parler avec son coeur,  
En idéaliste...

Ce n'est pas seulement croire en des temps meilleurs,  
Où l'on se comprendra... où l'on n'aura plus peur  
De la tour de Babel!... Non, être espérantiste,  
Ce n'est pas seulement brandir le vert fanion,  
En s'exprimant dans une langue d'union!...

Etre espérantiste,

Ce n'est pas seulement laisser guider ses pas,  
Par la douce clarté qui se lève là-bas,  
Jaillissant d'une étoile, en une nuit profonde...

Ce n'est pas seulement faire une vaste ronde...  
En chantant à la Terre un hymne fraternel,  
Dans un même langage, enfin universel!...

Etre espérantiste,

C'est d'abord, c'est surtout, en ce monde où nous sommes,  
C'est unir, c'est servir, c'est aimer tous les hommes!...

Lille, Avril 1963.

Guy AUGUEZ.



La kongresanoj eliris el la urbdomo - Valenciennes, 23-6-63 (Foto k  
kliŝo afable pruntitaj de "Courrier du Valenciennois").